

PENSEO

N-ro 337

nov. / 2019

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 30-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Eto (Ĉinio)

Spektado al ruĝaj folioj

Aŭtuna vent', kiel peniko,
ŝmiradas per kolora farbo
la foliojn de aceroj
jen de unu arbo post alia arbo.

Sur la monto ŝajne elmontriĝas
hela flavo, ruĝo kaj skarlato.
En zefiro tremas la folioj
de aceroj je onia ŝato.

La pejzaĝo bela logas
vizitantojn ar' post aro
por spektad' kaj aprecado
al kolorvaria foli-mar.



Kiam falas la folioj,
kvazaŭ papilioj kun leĝero
dance flirtas tien kaj alien
kaj finfine ili haltas sur la tero.

Ni rigardas de fora loko
al la foli-mar' kun miro.
Je alblovo ili eĉ similas
al veletoj en malrapida iro.

La tutaĵo de kompakta ruĝo
nin impresas kvazaŭ la ĉielo

ĉe vespero kiam la sun' subiras
kun radioj de rubeniĝanta belo.

La fajr-ruĝ' nin vere ravas
kaj, kvankam pluvas fride,
varmon al ni l' ĉarmo alportas,
nin animskuante ĝis-zenite.

Yanke (Ĉinio)

Penseroj en aŭtuna oktobro

I.

Mi ŝatas sidi en aŭtuna vento,
aŭskulti mute al folia falo
kaj al susur' de pluva la lamento,
kaj senti fridon de pluvguta klaro.

La vent' min kisas milde per kareso,
min refreŝigas pura la aero.
Sunlum' radias varmon sen eksceso,
mi ĝuas ĝin laŭplaĉe kun prefero.

Animo mia kvazaŭ flirtus sore,
leĝere flugus al la ĉielbluo,
verŝajne por veturi jen laŭvole
turismi en ĉiela regn' kun ĝuo.

En tranco mi revenas filmsimile
al la pasinto mia tre facile.

II.

Ve, en pasinto en aŭtuno same
mi ja ne havis tempon por satĝui
sunlumon, venton kaj pluvgutojn
jame,
sed nur laboris ja por kontribui

al mia familio en vivteno,
penegi tage preskaŭ sen ripozo.
Mi frue ellitiĝis en mateno
kaj penis ĝis vesper' kun seriozo.

Mi ne malŝparis monon en elspezo
kaj akumulis ĝin jen groŝ' post groŝo.
Suferis vere mi sub viva pezo,
mi ĉiam tenis monon en la poŝo.

Pasintaj tagoj jam foriris frue,
mi tamen ĝin memoras jen senskue.

III.

Nun kvankam mi laboras ne plu pene,
mi havas blankajn harojn je tempioj.
Ni vivas jam senĝene, senĉagrene,
mi tamen perdis volon jen kun
ambicioj.

Nereteneble la pasint' forpasis,
sed ĝi jam firme gravuriĝas vere
en mia kapo. Mi neniam ĉasis
promocion kaj famon kariere.

Mi ja postulas la kvietan vivon
sen ĝenoj, sed kun famili-akordo.
Mi kovas tian belan perspektivon,
kaj mi soifas je plibona sorto.

Penseroj miaj vagas de l' pasinto
al nuno en mistera labirinto.

Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Ĉu lasta ŝton'?

La lasta ŝton' ne estos ni,
neniam estos tiel ĉi.

Ni estas membroj nur en ĉeno
senfina eĉ kaj sen deteno.

Tiom da homoj mortnaskiĝas,
ni vivas eĉ, sed tuj aĝiĝas.

Futur' grizigas la kolorojn,
eĉ lastan ŝtonon, pafbudflorojn.

Ni do ne softe falos ĉiam,
en tombon eĉ aŭ urnen iam.

Ni estos fajre forlavitaj
kaj de vivantoj prirabitaj.

PAPOS NASCENTES (Brazilo)



Aŭtorretrato

de selfie al Self, oceandistanco
de mi al vi, danco
de mi al Di', fido
de mi al vi, rido.

Ĉi memportret',
ridet'!!!

Misfunkcio

tiom da memkono
sed konstato:
nur supraĵe min mi konas
pruvas tion la doloro
de amo sen kompromiso
jen miso
amo nur supozita
nur miso!

Sveta Konjashova (Rusio)



Matena humoro.
Ovo por omleto
Estis duvitela.
Eku kun rideto
Tago nova, hela!

* *

La naturo kuracas.
 Bezonas ni aŭtune
 Kuracon urĝe nune,
 Vetero—sunbalzamo,
 Kvieto, paco, amo.
 Karesas sava vento—
 Miraklo de momento.

Oktobro

Malfrua, bela, ora,
 Ĝojplena kaj kolora—
 Impresas nin aŭtuno.
 Ĉiele tage—Luno.
 Surtable—pom' matura.
 Serenas tag' plezura.
 Oktobro—belvestita...
 Ventblovo nur subita.

Verbum (Japanio)



mateno brilas ...
 ĉiu ajn domo iĝas
 tri-dimensia

densa obskuro...
 ruĝa lunarko kreas
 nunan aŭtunon

velkaj farbitoj
 skuiĝas en verando...
 neniuj vidas

libeloj giras...
 la tremanta ĉielo
 en la lageto

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Senluna nokt'

ie dolorkrias gitar'
 L'seĝo soleca!

Kato soleca
 ĉe la sojlo tremegas.
 La domo mutas.

Fino de l'nokto.
 La horloĝo mezuras
 mian solecon

Kiom da aŭtunoj
 signas l'kalendaro...Mi
 ne forgesas vin

Malvarma lito!
 La lucerno lumetas.
 Ne estas patrino!.

Timema cervin'
 trans la padoj forkuras.
 Ĉasistoj gvatas.

Renversis l'nokto
 en la fajran matenon.
 La tago ekpaŝis

Ĉambro. Piano.
 La klavoj ekŝormegas.
 Matena kafo.

Ĉambro malplena
 La surdeco bruegas
 Horloĝo ĉesis.

Fernando Pessoa



Portugala maro

Ho sala mar' , kiom , sale de vi ,
 ardas la vangoj al Portugali' !

Ni vin krozis , patrinaj hejmis ploraj ,
 la idoj preĝe dum tagoj senhoraj!
 Fianĉinoj restis sen sia nupt'
 dum vin posedis ni , mar' , el volupt' !
 Ĉu la penon valoris la sentimo?
 Valoras ĉio se grandas l' animo.
 Nepre, plani transen de l' Bojador
 estu plan' iri transen de l' dolor' .
 Se maron tempestega igis Di' ,
 ĉielon tamen metis super ĝi .

Esperantigis



Wel CR (Brazilo)

Jiang Xuefeng

Preĝo

Aĥ, neĝmontoj,
 ne lasu ilin ĉiujn
 supreniĝi.
 Restigu unu pinton al Dio
 kiel sidkusenon!

Aĥ, poetoj,
 kiel arbo sekreianta rezinon,
 verku viajn versojn!

Aĥ, Longa nokto,
 malŝarĝu la pezon
 kaj lasu ĉar-tiranton dormi iom!

Aĥ, homoj,
 donu viajn neelĉerpeblajn feliĉojn
 kaj senfinajn amarojn
 al viaj posteuloj
 kiel iliajn nutraĵojn!

Aĥ, Futian-Ebenejo,
 lasu min reiri
 al tiuj suferplenaj tagoj
 kun kuirfumo, avnjo kaj sukerkan-plantejo!

L' ulo, kiu kreskigis avenon
 ĝis sia lasta spiro,
 jam foriris rajde sur nuboj,
 dum la ĉevalo, kiun li nutris, ankoraŭ lin
 atendas.

Aĥ, amato, aĥ, malamiko,
 ĉu vi estas la sama homo?
 Bonvolu stari flanken,
 vi jam baras
 la sunlumon el la ĉielo.

Aĥ, Dio,
 bonvolu helpi min!
 Lasu min doni memon al mi
 kaj regi min mem.

Elĉinigis

Mandio (Ĉinio)

Mimoza Ahmeti



Mi vagabondas tra la stratoj

Vagabondas mi tra la stratoj por vidi vin,
 esperante
 Sed ne okazas ke ni trovu unu la alian, kara...
 Mi hezitas ke iunokte, postdorse,
 Frapas min neatendite nigra mano.
 Sentas mi, nokton je sonĝantaj steloj
 Oni mortigos min,
 Nokton je ĝojlumaj steloj...

Ĉiam, senĉese, lazurlume, en la miaj okuloj
 Via aprileca vizaĝo moviĝas. Kaj tiun
 matenon
 Trovos min mortigita je iu stratofino
 Timigitaj alproksimiĝas la hazardaj
 preterirantoj,
 La mian korpon oni ne tuŝos,
 La miajn okulojn ili vidos,
 Vian lazurluman vizaĝon ili distingos,
 Kiu, strange, vidas ilin ridante,

Indigne la preterirantoj pensos ke vi ja estas
La murdinto,

Pensos tiel ĉar ili estas p r e t e r i r a n t o j.
Ili denuncos vin fervore, ne ŝparante.
Mortigos ankaŭ vin, finfine, kara.
Certe, la ĵurnaloj kvietigos la opinion.
La vera murdisto saviĝos
Kaj tuttrankvile li la urbon trapromenos...

Novembra nokto

Volas mi promeni, tutan nokton ĉivespere, tra
la urbo
Tra la pluvlavitaj stratoj kaj oraj lumoj,
Krucirante...
Volas mi promeni dum ĉi tiu meznovembra
nokto.
Ion mi rememorante, ion mi rememorante
Sed vi ne demandu min.
Tion mi volis kiom la pensoj dolorigas,
Tion mi rigardis
Kiom la vidado malheliĝis,
Tion mi malestimas
Kiom mi ĝin naŭzis...

Promeni,
Tutan nokton, ĉivespere promeni,
Pro malsana amo, malsana mi estas...
Aeron de la pluvo lavita,
Aeron mi volas, mi diras.

1985

Lasu min libera

Lasu min, lasu min libera.
La homoj estas kiel la popoloj—
Ne sklavigu min!

Kaj kiel la nacioj ili estas—
Ne konkeru min.

Kaj kiel la ŝtatoj ili estas—
Ne aŭdacu...
Lasu min, lasu min libera,
Mi diras vin.

Alvenos ja la tago
Kiam en la mondo ne estos
Nacioj, popoloj kaj ŝtatoj profetoj.
Estos homoj
Kaj nur tiam
Nia amo ne sklavigos.

1985

Mi, la amo

Nenio helpas min
Reveni ĉe vin.
Nek objektoj, nek homoj, nek vi mem helpas.
Malhelpas min la vojoj kun spacoj okupitaj de
la animoj,
Malhelpas la pordoj de la konscio
Kie la okuloj elstaras
Dekoj da filozofoj de la moralo.
Ci, je romia malvarmsango en la vejnoj
Min malhelpas.
Romo disfalis, antaŭ ĝi
La Antikva Grekio, La Malnova Egiptio.
Dufoje surgenuiĝis la mondo en ĉi tiu finala
jarcento.
Nur mi ankoraŭ ne enfalis, mi ne surgenuiĝis.
Mi, la homo. Mi, la amo.
Kvankam neniu voĉo respondas
nur la armiloj
neniu voĉo
Krom la muĝada maro de la milito.

1988

Mi ne forgesis vin

Ĉu tiun momenton vi ne rememoris pri mi?
Ĉu pri mi vi ne rememoris?
Vi ja havas multajn zorgojn, rutinajn
Necesajn.
Mi estas ja forgesita de vi, ĉe iu taga angulo
sed mi vin ne forgesis.

Tiun homan sunon mi ne perdis
 Nomata kredo
 Kaj atingonte vian
 Supran sojlon, la liberon de laflugilo, vian
 Lumkreadon
 Eksplosos la kratero el la miaj profundoj
 neatendite.
 Okazos
 Dismetiĝo kaj freŝeco neaŭdita
 Intervidiĝos ni sentece,
 Enamiĝintaj
 Kaj la soifo por vi min okupanta
 Por mi elokupos vin.

Elalbanigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Jia Dao (779 - 843)

Sensukcesa vizito al ermito

Sub pino mi demandas servoknabon,
 Li diras: "Majstro iris al montaro
 Kolekti drogoherbojn; vi ne povas
 Lin trovi pro l' profunda nubomaro."

Wang Wei (701 - 761)

La ermitejo

Kvietas monto. Nevideblas homoj,
 Aŭdiĝas tamen homaj voĉaj sonoj.
 L' arbaro dronas en vesperkrepusko,
 Rebrilo ĝia restas sur la musko.

Birdpepa montrojo

Senfare mi aŭskultas falon de osmantaj floroj;
 En la printempaj montoj regas nokta la kvieto.

Ekmiras birdoj ĉe l' apero de la luno, kiuj
 Fojfoje pepas super l' intermonta rivereto.

Pentraĵo

La montoj malproksimaj estas koloritaj,
 Proksime la fluanta akvo ne aŭdiĝas.
 Ĉe la printempa fin' ankoraŭ pompas floroj;
 Pri la alven' de homo birdoj ne timkriĉas.

Zhang Jiuling (678 - 740)

De kiam vi foriris...

De kiam vi foriris, mi ne povas
 Labori ĉe kaduka la teksilo.
 Sopiras al vi mi kiel plenluno:
 Malkreskas ĉiunokte ĝia brilo.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)

Ouyang Xiu (1007-1072)

—laŭ melodio *Papilio super floroj*
 En ĉi kort' profunda, tre profunda,
 poploj kaj salikoj en nebula svago,
 apudantaj jen en nombro tre abunda.
 Pendas pordkurtenoj mult-tavolaj
 bele ornamitaj ekster la imago.

Luksaj ĉevalĉaroj haltas antaŭ l' pordo
 kaj nobelaj dandoj por volupt-plezuro
 ja frekventas tien al ĉi tiu korto.
 Ŝi rigardas pene sur la alta turo,
 sed ne vidas vojon al la ejo por komforto.

Ĉe l' printempa fin' kun pluv' kaj vento
 furiozaj, ŝi elpeli la krepuskon volas,
 sed printempon ŝi ne povas dum momento
 ja reteni, dum ŝi enuplene solas.

Kun okuloj larmoplenaj ŝi demandas al
 floraro:
 "Ĉu vi, ve, komprenas mian senton?"

sed silente ili ne respondas ŝian plendon,
kaj transflirtas la pendolon ar' post aro.

—laŭ melodio *Reveno de amato*

Meze de l' printempo en libero
ŝi ekskursas al la sud-ĝardeno.
Jen aŭdiĝas sub serena la vetero
la henado de ĉeval' en ĉirkaŭpreno
de zefiro alblovanta kun leĝero.

Post velkad' de prunaj floroj
drupoj grandas kiel fabograjnoj;
salikarboj svingas siajn branĉojn
mincajn kiel ŝiajn harofranĝojn;
papilioj flirtas en taglumaj horoj.

Floroj pezas kun roslarmo,
super herboj pendas base
kuirfum' kaj nebulsvarmo,
foraj hejmoj jam sin garnas kaŝe
per kurtenoj jen por varmo.

Ŝi revenas post pendolsvingado
laca kaj langvora en dormema stato.
Ŝi demetas vestojn por ripozi bone,
ŝi abrupte vidas paron da hirundoj
jam reveni, nesti sur la trabo kvivitsone.

Su Shunqin (1008-1048)

PAVILONO CANGLANG

—laŭ melodio *Preludo de akva melodio*

Pitoreskaj bordoj de la lago Taihu.
Pura kaj kvieta Dongting-monto.
Fiŝoj kaj fiŝegoj kaŝas sin sub ondo
de la lago vasta, kiu vualitas
per nebul' ĝis horizonto.
Kiam mi ekpensas pri lojalaj korteganoj,
tuj vidiĝas boatet' tra akvotondo
alrapidas jen kun fiŝasaĵo,
spite al ŝtormpluv' vespera, giras
ĉirkaŭ l' sabla benk' al hejma rondo.

Viro ambicia

devas doni lumon
kiel ardo sunradia,
honti pri nenifarado.
En la aĝ' plenenergia
eĉ grizharoj kovras mian kapon,
marasmiĝas tro vizaĝo mia.
Volas mi hokfiŝi en lagakv' frida,
sed mi timas, ke konjekto fia
de akvbirdoj pelus fiŝojn
disde mia hok' al lok' alia.
Mi preferas do veturi per boato
tra fragmitoj kaj spektadi silenteme
ondojn de lagakvo multvaria.

Cai Ting (1014-1079)

—laŭ melodio *Ĝoja oriolo*

Frumatene en aŭtuno
lima fortikaj' kovrita jen per prujno
firme staras sub flavnuboj
en purpur-vapora la brakumo.
Antaŭ ĝi velkintaj herboj
skuiĝadas en la venta zumo.

La militĉevaloj henas kontraŭ la vento,
kaj sovaĝanseroj kriĉas kvazaŭ en lamento
sub la lun' en aŭroronta firmamento.

Ĉe l' nordlimo fridas la kiraso
de l' soldatoj. Ili sin ekzercas
en skermado kaj rajdado en amasoj,
kaj kantadas trist-impone.
Ili marŝas per decidaj paŝoj
kaj ja ĵuras rekompenci l' gracon
de l' imperiestr' per meritĉasoj.

Regas ĝoj' en tuta landolima sfero,
oni jam armilojn metis en tenejon
pro pacema la situacio en espero.
La soldatoj junaj el provinco Shanxi
prenas eĉ militservadon kun fiero.

Meze de ridsonoj en interbabilo
nur sufiĉas fari mesaĝ-fajron
por informi pri pacemo kaj stabilo

jen de temp' al tempo, tiel ke l' popolo
vivas kaj laboras en trankvilo.
La monarko sankta zorgas pri l' landlimo,
kaj potenco lia lumas kun minaca brilo,
ke la malamikoj ne kuraĝas fari
agresagojn kun aroga fi-deziro.

Tamen jaroj pasas flue,
ve, jam ni garnizonistoj maljuniĝas
kaj ni povas streĉi fortojn nun ne plue.
Paco regas, kvietiĝas la landlimo.
Ni jubilu, tostu, kaj vivadu ĝue.

Wang Anshi (1021-1086)

Sopire pri antikvaĵoj en Nankino

—laŭ melodio *Aroma laŭbranĉo*

Sur alta tureg' mi vagigas okulojn:
jen de ĉi antikva ĉefurbo la belo
de malfru-aŭtuna tempdaŭro—
iome rigora vetero;
purklare jen kiel blanksilka rubando
senĉese fluadas la mil-lio*-longa rivero;
montpintoj helverdaj rekt-staras pafsage;
en lumo de l' sun' subiranta velŝipoj
navedas jen sur flu-nivelo;
vinvendaj ŝildflagoj oblike starantaj
flirtadas en forta ventpelo;
en foro vidiĝas pentritaj boatoj
alflosas sub buntaj nuberoj;
ardeoj batsvingas flugilojn
kaj soras ĝis blua ĉielo.
La tutan vivbildon ne povas
elpentri oni laŭ reala fidelo!

Antaŭe nobeloj kaj princoj
strebadis al lukso konkure.
Tragikaj eventoj en la historio
restigis malamon kaj triston ja nure.
Tiu ĉi mil-jara ĉefurbo ja spertis
prosperon, humiligon fojplure,
neniel utilas lamenti pri ili.
Malnovaj aferoj de ses dinastioj,

ja kiel akvfluo, forfluis senspure.
Sed ekster la urbo skuiĝas
velkinta herbaro susure,
malvarma nebulo plenkovras
brilantan la verdon velure.
Ankoraŭ hodiaŭaj knabinoj
en la amuzejoj kantadas plezure
de tempo al tempo la kantojn
pri land-ruiniĝo dormlule.
**lio: tradicia ĉina mezurunuo de longo, egalanta 0.5 kilometron.*

Elĉinigi



Veĵdo (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEKA

Monta arbo

§20-01

Kiam Zhuangzi promenis sur monto, li vidis grandan arbon kun luksaj branĉoj kaj folioj. Iu arbohakisto haltis apud la arbo, sed li ne tuŝis ĝin. Zhuangzi demandis kial.

“Ĉar ĝia ligno taŭgas por nenio,” diris la arbohakisto.

“Dank' al sia senutileco,” konkludis Zhuangzi, “tiu ĉi arbo atingos la finon de sia natura vivdaŭro.”

Malsuprenirinte de monto, Zhuangzi tranoktis en la hejmo de maljuna amiko. Lia amiko estis tiel ĝoja, ke li diris al sia juna servisto, ke li mortigu anseron kaj kuiru ĝin por lin regali. La servisto demandis:

“Kiun mi buĉu? Ĉu tiun, kiu gakas aŭ la alian, kiu ne gakas?”

“Tiun, kiu ne gakas,” respondis la mastro.

En la sekva tago la disĉiploj demandis Zhuangzi:

“Hieraŭ la arbo sur la monto ĝisvivis la finon de

sia natura aĝo pro sia senutileco, kaj nun la ansero en la domo de mastro estis buĉita pro sia netaŭgeco. El tiuj ĉi du cirkonstancoj, kiun do vi preferus, Majstro?”

“Mi preferus esti inter la taŭgeco kaj sentaŭgeco,” respondis Zhuangzi kun rideto. “Sed esti iom utila kaj iom senutila ŝajnas pozicio bona, sed fakte ne. Tial en tiu pozicio mi same ne povos eviti embarason. Se mi povos sekvi la naturan evoluon de la estaĵoj kaj libere vagadi en la regno de senagado, mi havos neniajn embarasojn. La perfekta homo estas libera de laŭdoj kaj mallaŭdoj, aperas kaj malaperas laŭplaĉe kaj adaptiĝas al la tempoj sen alproĉiĝi al io ajn. Li iras supren kaj malsupren en perfekta harmonio kun la naturo, libere vagadas en la regno de la origino de la estaĵoj. Li mastras la estaĵojn sen esti mastrata de io ajn. Kiel do li povus havi ian embarason? Tia estas la maniero, kiun sekvis Shennong kaj la Flava Imperiestro.

“Sed ne tia estas la okazo koncerne la vulgarejn gustojn kaj homajn interrilatojn. Kie estas kuniĝo, tie estas disiĝo; kie estas kompletiĝo, tie estas detruo; kie estas akriĝo, tie estas malakriĝo; kie estas honoroj, tie estas riproĉoj; kie estas atingoj, tie estas malsukcesoj; kie estas kapableco, tie estas intrigo; kie estas senkapableco, tie estas ofendo. Kiel do vi povus esti certa pri io ajn? Ho ve, disĉiploj, tenu la jenon en la menso: la naturo estas la sola, al kio vi povas fidi!”

§20-02

Kiam Shinan Yiliao faris viziton al la markizo Lu, tiu havis ĉagrenitan mienon. Shinan Yiliao demandis:

“Kial vi mienas tiel ĉagrenite?”

“Mi studas la manierojn de la antikvaj reĝoj kaj daŭrigas la heredaĵon de miaj antaŭuloj. Mi ĉiam respektas la sanktajn spiritojn kaj honoras la saĝulojn. Mi persone praktikas ĉion tion sen momenta malstreĉiĝo, sed mi ankoraŭ ne povas eviti la malfeliĉon. Jen kial mi ĉagreniĝas.”

“Via maniero eviti la malfeliĉon,” diris Shinan Yiliao, “estas tro supraĵa. Pensu nur pri la malharaj vulpoj kaj la bele makulitaj leopardoj. Vivante en la montaj arbaroj kaj sin kaŝante en la kavernoj, ili ja estas sufiĉe kvietaj. Eliĝante nokte kaj restante en la kavernoj tage, ili ja estas sufiĉe singardaj. Por teni sin

for de la homa ĉaso, serĉante nutraĵon nur ĉe la malproksimaj riveroj kaj lagoj malgraŭ siaj soifo, malsato kaj laceco, ili ja estas sufiĉe singardaj. Kaj tamen ili ne povas eviti esti inside kaptitaj. Je kio do ili kulpas? Ilia malfeliĉo venas de iliaj bela felo kaj bela haŭto. Ĉu la regno Lu ne estas kiel viaj felo kaj haŭto? Mi esperas, ke vi forĵetos vian fizikan formon, senigos vin je viaj felo kaj haŭto, purigos vian menson, forgesos viajn dezirojn kaj poste vagados en la sovaĝejo.

“En la lando Nanyue troviĝas regiono nomata Jiande. La tiea popolo estas simpla kaj honesta, kun malmulte da pensoj pri si mem kaj reduktitaj deziroj. Ili produktas, sed ne amasigas riĉaĵojn; ili donas, sed ne postulas redonon; ili ne scias, kion signifas la justeco; ili ne scias, kion celas la ritoj. Ili sekvas sian naturan inklinon kaj tiel alkonformigas sin al la Taŭo. Vivante ili estas feliĉaj kaj gajaj; mortinte ili ricevas decan enterigon. Mi esperas, ke vi abdikos vian tronon, forlasos la vulgaran mondon, kaj vivos laŭ la Taŭo.”

“La vojo al la Taŭo estas longa kaj danĝerplena,” diris la markizo Lu, “kaj riveroj kaj montoj kuŝas sur la vojo. Kiam mi havas nek boaton, nek ĉaron, kion do mi faru?”

“Se vi ne estas aroganta kontraŭ viaj regatoj, nek alproĉiĝas al via palaco, vi jam havas viajn boaton kaj ĉaron,” diris Shinan Yiliao.

“La vojo al la Taŭo estas longa kaj senhoma,” diris la markizo Lu, “kiu do estos mia akompananto? Kiam mi ne havas grenon, nek alian nutraĵon, kiel do mi povos atingi mian celon?”

“Reduktu viajn elspezojn kaj malfortigu viajn dezirojn,” respondis Shinan Yiliao, “kaj vi havos pli ol sufiĉan, eĉ se vi havus neniom da greno. Transpasu la riverojn kaj la marojn, kaj vi vidos senfinan spacon. Ju pli foren vi vojaĝos, des pli fora ŝajnos via celo. Kiam la akompanantoj diros al vi bonvojaĝon kaj iros returne de la riverbordo, vi baldaŭ eniros en la malproksiman regionon de la Taŭo!

“Tiuj, kiuj regas super aliaj, havas zorgojn, dum tiuj, kiuj estas regataj de aliaj, havas maltrankvilon. Tial la reĝo Yao nek regis aliajn, nek estis regata de aliaj. Mi esperas, ke mi povos senigi vin je viaj zorgoj kaj maltrankvilo, por ke nur la Taŭo estu vi

akompananto dum vi vagados en la regno de perfekta libereco.

“Supozu, ke homoj transpasas riveron en boato, kaj alia malplena boato venas kaj hazarde kunpuŝiĝas kun ilia boato. Tiukaze eĉ kolerema homo ne koleriĝas. Sed se troviĝas homo en tiu alia boato, ili krios al la homo, ke li flankenpuŝu sian boaton per la hokstango. Se li ne aŭskultos ilin je la unua fojo, ili ree krios. Se li ne aŭskultos ilin je la dua fojo, ili krios triafoje. Se li ne aŭskultos ilin je la tria fojo, ili certe verŝos torentojn da insultoj sur lin. Ili ne koleriĝas en la unua okazo, ĉar la boato estas malplena; ili koleriĝas je la dua okazo, ĉar en la boato troviĝas homo. Kiu do povus fari malutilon al la homo, kiu vagadas en la mondo kun libera kaj malplena menso?”



Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinio)

Kiu estas pli frandema?

el la rakontoj pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Intence

volis bienul’

moki Afanti foje.

Li kvazaŭ kun venĝa brul’

ruze sen skrupul’

invitis

Afanti humile

al manĝad’ de melonoj.

Li kapjesis ĝentile

kaj... kaj plenmire.

Dum manĝad’

li ŝovis ŝtele

ŝelojn antaŭ Afanti-n,

ke melonŝeloj ŝvele

montis surtere.

Bienul’

insidis krie:

“Amikoj, rigardu lin.

Kiel manĝis manie

li senracie.

Li manĝis

multe pli ol ni.

Kia frandemulaĉo!”

Ĉiuj mokridis kun kri’

kaj sen simpati’.

“Ni juĝu,”

Afanti ride

diris, “kiu voremas

plej! La mastro akride

manĝas avide

eĉ ŝelon

de akvmelono,


sed ni nur ĝian karnon.

Li estas, laŭ rezono,

frandema homo!”



Jadranka Miric (Serbio)



Benita Lumo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Oktobra

aŭtuna somer`.

Ĉielo malfermiĝas.

Luno montriĝis . Ja, Ver`

al la pasaĝer`!

Ŝin oni vidas

solas surborde .

Ambaŭ vangetoj

ruĝis. Steloj akorde

brilas. En orde.

Ondetoj

arĝentas brile.

Murmurante inter si.

Foje Lun` fuĝis mile

de ni. Aprile

revenos ,

kiam herbejo

verdiĝos kaj floretoj

ekfloros. En ĉambrejo

danc`. Lumos ejo.

Benita

estu nia am`!

Pacon, amikecon. Am`

revenos per am`.

Luiza CAROL (Israelo)



Sopiro en oktobro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Flugas

brua birdaro

super dezerta kampo,

super flava arbaro,

super la maro.

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Yu Xianbin

Lotado

Ventego kaj ondegoj. Boato, kiel folio, leviĝis kaj malleviĝis inter pintoj kaj valoj de ondoj. Estiĝis truo, tra kiu marakvo enfluis. Sur la boato troviĝis du homoj, juna kaj maljuna. Ili streĉe laboradis por ŝtopi la truon, sed ili ne sukcesis kaj akvo ankoraŭ entrudiĝis.

Ili reciprokis la rigardon. Sur la vastega maro videbliĝis nenia signo de homo. Ilin kaptis iom da malespero.

Tamen ekzistis espero. Alia boato glitadis inter ondoj, alproksimiĝante rapide.

Evidente la boatisto estis tre lerta en stirado de la boato. Ĝi, kiel kuglo, salte glitadis en vento kaj ondoj kaj post nelonga tempo atingis la randon de la boato, en kiu troviĝis la junulo kaj maljunulo.

La espero sur ilia vizaĝo tuj malaperis kaj fariĝis malespero.

Li estis pirato.

Antaŭ nelonge aperis pirato sur la maro, kiu kondukis boaton tien kaj alien. Post prirabado de fiŝistoj, li fulme foriris kaj malaperis senspure. Pro tio la loka polico dissendis anoncon por aresti lin. Ĉar la arest-avizo estis gluita ĉie, la maljunulo kaj la junulo ĝin vidis kaj ili certis pri li.

Vidinte ilian mienon, la pirato malvarme hm-is kaj demandis: “Ĉu vi rekonas min?”

Dirinte nenion, ili ambaŭ kapjesis.

La pirato diris al ili, ke li ne rabas hodiaŭ, sed nur savas homojn.

Ili du reciprokis la rigardon kaj brilo ekflagris en iliaj okuloj.

La pirato ĉikaneme diris al ili, ke li decidis savi unu el ili kaj restigi la alian. Aŭdinte tion, la junulo stuporiĝis kaj tuj fingromontris al la maljunulo,

dirante: “Li...” Antaŭ ol li finis sian parolon, la pirato ekrondigis siajn okulojn kaj laŭte kriis: “Fermu vian buŝon!” Li diris, ke en sia propra boato li rajtas fari, kion li volas, ne permesante al aliaj diri alion, alie li sin turnos for kaj savos neniun.

Ili ambaŭ sciis, ke la pirato restas senkompata kaj kruele malvarmkora, kaj ke lia parolo pezas kiel fero kaj estos certe plenumita.

Ili tenis sian buŝon fermita, rigardante lin.

La pirato estis tre kontenta pri ilia obeema konduto kaj ordonis al ili fari du lotojn el papero, unu kun surskribo “foriri” kaj la alia kun “resti”. Tiu agu laŭ la surskribo, kiun li tiris el la du lotoj.

La maljunulo, forgesante kion la pirato malpermesis, tuj diris: “Mi faru lotojn.”

La junulo ankaŭ konkure diris: “Mi faru lotojn.”

La pirato ĵetis malestimon ekrigardon al ili kaj montrante la maljunulon, diris: “Vi faru do.”

La maljunulo ĝoje ridetis kaj farinte du paperbulojn laŭ lia ordono, metis ilin sur la manplaton. La junulo, kun larĝigitaj okuloj, rigardis jen unu bulon jen la alian heziteme. La pirato senpacience kriis: “Ne hezitu. Tuj prenu unu.”

La junulo prenis unu paperbulon kaj disfaldis ĝin, sur kiu skribiĝis “foriri”. La pirato eklevis la okulojn kaj moke diris: “Vi estas bonŝanca. Nun vi povas savi vian haŭton.”

Kun ruĝiĝintaj okuloj, la junulo petis al la pirato, ke li disfaldu la alian paperbulon.

La pirato ĵetis al li skeptikan rigardon kaj ordonis al la maljunulo: “Ĝin disfaldu!”

Sub la devigo de la pirato la maljunulo disfaldis la alian paperbulon, sur kiu ankaŭ skribiĝis “foriri”. La junulo diris kun larmoj: “Mi ne volas foriri, oĉjo. Mi akompanu vin ĉi tie.”

Skuante la kapon, la maljunulo diris: “Foriru rapide. Vi estas juna kaj viaj familianoj ne povas vivi sen vi.”

La junulo staris senmove. La boato malrapide sinkis kaj la marakvo jam altiĝis ĝis iliaj piedodorsoj. La maljunulo maltrankviliĝis, kriante: “Foriru do. Kial vi rifuzas foriri, se vi havas tian bonŝancon?” Tamen la junulo ankoraŭ staris tie. Kiel ajn la maljunulo forpuŝis lin, li senmoviĝis, kvazaŭ ŝtala statuo.

La okulungulo de la pirato eksaltis. Kaj li diris: “Vi ambaŭ enboatiĝu.”

Post momenta stuporiĝo ili ambaŭ tuj ekkomprenis kaj senĉese jesis. Ili helpis sin unu la alian kaj suriris la boaton de la pirato. Turminte la kapon, ili vidis sian boaton sinki, sinki en ventego kaj ondoj. Post momento ĝi senspuriĝis kaj estiĝis akvokirlo, kiu malaperis en turnado.

La boato de la pirato, kvazaŭ plumo, flosis laŭ ventego kaj ondoj, kaj baldaŭ atingis la bordon.

Post kiam la maljunulo kaj junulo iom kvietiĝis el paniko, ili turnis la kapon kaj vidis neniom de lia boato. Kun suspiro ili reiris al sia propra hejmo. Post nelonge ili respektive ricevis la telefonalkvokon de policejo, dirante, ke iu krimulo volas intervidiĝi kun ili por esprimi sian dankemon.

Kun dubemo ili iris al la policejo.

Tie ili vidis la krimulon, kiu estis neniu alia ol la pirato. Li sin denunciis al la polico.

La pirato rakontis, ke li havis amikon kun mort-viva rilato, tiel bonan, kiel sian ombron, sed lia amiko mem insidis kontraŭ li: bankrotigi lian kompanion kaj kaŭzi al li amason da ŝuldoj. Kaj lia amiko eskapis senspuro kun granda sumo da mono.

Senrimede li utiligis sian elstaran surakvan kapablon por fikonduti kiel pirato sur la maro.. Li faris senkompatan prirabadon, konsiderante, ke ĉiuj mondanoj estas tiom rigore kruelaj kaj ne necesas por li nutri simpatian al aliaj.

Ĉe tio li faris profundan riverencon al ili ambaŭ, dirante: “Dankon al vi. Estas vi, kiuj konigas al mi, ke en la mondo ne nur ekzistas insido kaj perfido, sed troviĝas pli da bon-traktado, zorgemo kaj bonkoreco.” Dirante, li montris rideton sur la vizaĝo.

La maljunulo kaj la junulo ankaŭ ridetis. Ili trovis, ke la pirato fariĝas belaspekta, kiam li ridetas.

Elĉinigi

Fangfang (Ĉinio)

Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Retadreso: vejdo@163.com

www.elperno.cn/penlisto.htm